FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner - Esperanto - Vereinigung
in der Stiftung Bahn - Sozialwerk

Fondita 1952 Numero 4 oktobro/ decembro 1999



Giĉeto de la Germana Fervojo DB en la kongresejo de UK Berlin
(ambaŭ fotoj Gießner)

Lasta jarkunveno antaŭ 2000

La aŭtuna suno brilis nur malofte, kiam la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) okazigis sian tradician jarkunvenon inter la 8a kaj 10a de oktobro 1999. 55 membroj kaj geamikoj kolektiĝis en Mülheim situanta ĉe rivero Ruhr. Krom la kutima laborkunsido atendis ilin kultura kaj turisma programo. En la festvespero bonvenigis Dietmar Petzold, membro de la BSW-ĉefestraro, per kuraĝiga alparolo kaj promesis pluan subtenon. Li atentigis pri novaĵoj sekve de strukturaj ŝanĝoj en la fondaĵo Fervoja Soziala Organizaĵo. Laŭ lia aserto la libertempa agado por Esperanto estas plene integrita en BSW kaj FISAIC (Internacia Ferderacio de kulturflegantaj Fervojistoj). Por la BSW-distriktoj Essen Hermann Mooren transdonis salutojn. Li akcentis la laŭdindan eblon superi lingvajn barilojn per Esperanto. Afablaj salutoj venis ankaŭ de eksterlandaj gastoj: Dina Deloyer (Belgio), Elena Mateeva (Bulgario), Miroslav Smyĉka (Ĉeĥio) kaj Annelies Fiechter (Svisio). Ĉeĥa duopo Smyĉka (Tenoro) kaj Blahoslava Dvorakova (piano) rikoltis meritan aplaŭdon per kortuŝaj popolkantoj kaj belsonaj arioj. Kontraste al tio ĉarmaj gejunuloj akcelitaj per laŭta rokmuziko montris modernajn, viglajn dancojn. GEFA-prezidanto Joachim Gießner, kiu gvidis tra la vespera programo, estis poste unu el la fervoraj dancemuloj laŭ plaĉa muziko de duopo Belsono (Brigitte Stenger kaj Joachim Hart). La antaŭan matenon, dum la aliaj kongresanoj vizitis kun ombreloj vidindaĵojn de la urbocentro, la oficialuloj partoprenis la laborkunsidon. Hans-Joachim Ruth de la BSW-ĉefestraro la nova kompetentulo por kultura kaj libertempa agado, prezentis la situacion de fondaĵo BSW kiel komerca entrepreno. Liaj modifitaj preskriboj validas ankaŭ por GEFA. La cetera tagordo antaŭvidis por GEFA-estraro kaj komisiitoj la okupon pri pasintaj eventoj kaj venontaj taskoj. Germana Fervojo laŭdis la Esperanto-interpretistojn, kiujn GEFA disponigis en la DB-giĉetoj dum la Universala Kongreso de Esperanto en Berlin. Oni diskutis pri la venontaj IFEF-kongresoj: Hungario (2000),Ĉeĥio (2001) kaj Bulgario (2002). La pliaĝulojn invitos komisiito Rolf Terjung al Düsseldorf (13. 04. 2000), dum la 43a GEFA-Jarkunveno okazos en Berlin laŭ anonco de komisiito Horst Jasmann (6. - 8. 10 2000). La aktivaĵoj, inter ili regule aperantaj artikoloj en la magazino „Unser BSW", celas informi interesitojn pri GEFA-aranĝoj.

Komence de la dimanĉa matineo GEFA-prezidanto Gießner atentigis laŭde, ke GEFA-membro Heinz Schindler estas honorigita per la Oomoto-medalo pro sia multjara agado, precipe en aziaj landoj, kaj pro sia grandanima financa helpo. Rolf Terjung montris en diaprelego la historion de la Rejna Fervojo inter Osserath kaj Dortmund. Unuafoje oni uzis pramŝipon, per kiu inter 1865 kaj 1874 trajnoj povis esti transportataj trans la Rejn-riveregon. La programon kompletigis denove la menciitaj duopoj per belaj kantoj kaj muzikaĵoj. Krome infangrupo, kiu apartenas same kiel la antaŭtagaj dancistoj al la Karnevala Societo TYG el Duisburg, prezentis viglajn dancojn. La spektantoj, plej multaj jam en progresinta aĝo, volonte dankis per aplaŭdo.

Kiel kutime ekskurso per aŭtobuso ne povis manki. Celo estis la pejzaĝa parko Duisburg Nordo, pli precize la iama ŝtalfandejo. Du spertaj gvidantoj klarigis dum la rondirado la historion kaj laborprocedon de la ne plu funkcianta ferfabriko. Kulmino

estis la grimpado al 70 m alta altforno. Tie, en sinsekvaj tavoloj de koako kaj erco miksita per specifaj mineraloj, ekestis je altegaj temperaturoj kruda fero, kiu per aldona traktado ricevis la deziritan ŝtalkvaliton. Dum la sekva kunestado en la apuda restoracio la vizitantoj klopodis digesti posteriore multnombrajn informojn. Estis nekutima eksterordinara ekskurso, tamen impresiga, ĉar ankaŭ la fervojo ludas gravan rolon kiel transportilo. Tamen multe pli interesa estis la vizito al funkcianta ŝtalfarejo en Duisburg Hamborn organizita post la jarkunveno por 21 interesitoj. Du inĝenieroj de entrepreno Thyssen Krupp klarigis dum rondirado la vojon de erco ĝis ekspedpreta varo, ĉu kiel reloj kun maksimuma longeco de 120 m, ĉu kiel laminita lado nur 1,5 mm dika. Kaj la plej granda surprizo: apenaŭ videblis laboristoj; ili regas ĉion per elektronikaj instalaĵoj. Gigantaj gruoj kaptas pezajn cisternojn kun flua fero, ruĝe ardantaj feroblokoj glitas tra rulantaj ĉenstabloj, ruloj de lamenita lado estas aŭtomate transportataj. Ne mirinde, ke post la sekva tagmanĝo en la kantino ne ĉesis demandoj al la gvidantoj pri tekniko, konkurenco kaj komercado de tiu ŝtalfabriko.

Resume konstatindas, ke ankaŭ la 43a jarkunveno, la lasta en tiu jarcento, necesis por okupiĝi pri niaj taskoj, ricevi informojn de kompetentuloj kaj - nelaste - por ĝui la specifan etoson, kiun konas nur esperantistoj. Bone, ke kongresejo kaj tranoktejo troviĝis en unu hotelo. Bone, ke la loka gazeto favore raportis. Dankon al la komisiito Rolf Terjung pro la modela organizado. Espereble partoprenos pli multaj amikoj de Esperanto nian venontan jarkunvenon. Certe valoras vojago al Berlin. W.B.

Jarraporto 1999

Pri la periodo inter la jarkunvenoj Linz (okt. 1998) kaj Mülheim / Ruhr (okt. 1999). Ni rekomendas relegi la respektivajn paĝojn en 1 - 3/99

Enkonduko

La situacio kompare al la pasinta jaro neniel ŝanĝiĝis. Sekve ni ripetas la resp. tekston el la pasintjara raporto:

La rilatoj inter la „Fondaĵo Fervoja Sociala Organizo" (Stiftung Bahn - Sozialwerk) kaj GEFA pri kies favora evoluo ni raportis pasintjare, daŭris en sama senco. Ĉiuj kulturaj libertempaj grupoj trovis sian lokon en la multvaria komplekso de BSW. La gvidinstancoj interesiĝas pri nia agado kaj atente sekvas ĝin. Kontraste al tiu pozitiva flanko la negativaj konsekvencoj el la privatigo de la fervojo bedaŭrinde ankaŭ daŭras, eĉ plifortigas, tiel ke la ĝenerala situacio de nia asocio meritas la atribuon „en danĝero".

Ni funebras pri

Rudolf Eigendorf	23. 05. 99
Li ripozu en paco	(ne atingis nin alia anonco)

Rondaj naskiĝtagoj kaj festoj

Joachim Gießner	(85) 23. 12. 98
Erhard Herlitze	(75) 11. 02. 99
Elfriede Kruse	(85) 13. 03. 99
Joachim Schrapp	(85) 30. 08. 99

Denove GEFA kore gratulas.

1. **Internaj aferoj**

1.1 **Membronombro**

Al BSW - estraro estis anoncitaj 234 (244) membroj.

1.2. **Kursoj**

Memstaraj kursoj flanke de GEFA ne okazis. Nur kelkloka partopreno ĉe aliaj organizoj sen menciinda rezulto. Sama validas por la telekurso.

1.3. **Funkciuloj**

La membro de la laborkonsilantaro Hans - Jürgen Riehn subite grave malsaniĝis kaj devis ĉesi sian kunlaboron. Preskaŭ du jardekojn li fidinde kaj akurate administris la BSW -financrimedojn de GEFA, por kio li meritas koregan dankon. Lian postenon transprenis ekde la 1a de julio la distriktkomisiitino de Erfurt / Halle, s-ino Helga Vogelsang, al kiu ni tre dankas por ŝia preteco. Ŝi sekve fariĝis membro de la labor-konsilantaro.

2. **Kunlaboro kun IFEF**

2.1. **IFK Le Mans**

En la 51a IFK partoprenis 23 membroj de GEFA. Dum tiu kongreso du GEFA - membroj estis nomumitaj honoraj membroj de IFEF, nome laŭ propono de GEFA post morto Gernot Ritterspach, laŭ propono de l´estraro Otto Rösemann. La dokumenton por Ritterspach la GEFA - prezidanto transdonis al lia vidvino.

La postkongreson en Colleville (Normandio) partoprenis 8 germanoj.

2.2. **Faka laboro**

Ĉar la gvidanto de la Faka Komisiono (FK), d-ro Halász, ĉesis agi en tiu posteno, nia membro d-ro Hoffmann provizore transprenis la gvidadon de la terminara sekcio de FK (Inĝ Kovar gvidas la Fakan Aplikan Sekcion).

3. **Kunlaboro kun BSW**

Kiel esprimite jam en la „enkonduko", la kunlaboro kun BSW estas bona. Kun praktika subteno de BSW ni sukcesis, ke la Germana Fervojo (DB) dum la tuta Universala Kongreso Berlin disponigis komputilon kun servanto, Ĝi funkciis dum la tuta semajno en la kongresejo. Nia grupo en Berlin disponis esperantistojn kiel perantojn. La fervojistan fakkunvenon ĉeestis 70 personoj. d-ro Dietmar Petzold reprezentis la ĉefestraron de BSW. Post tiu kunveno okazis tre interesa busekskurso al la grandega konstruaĵo de la estonta centra stacio de Berlin. Ebligis ĝin finance la BSW - ĉefestraro, al kiu ni dankegas.

4. **Aranĝoj, kontaktoj**

La 42. jarkunvenon de GEFA en Linz /Rhein (9. - 11. 10. 1998) partoprenis ĉirkaŭ 70 personoj, inter ili gekolegoj el 4 aliaj landoj (vd. FE 4/98). Krome GEFA - membroj vizitis diversajnaciajn kaj internaciajn aranĝojn.

5. **Informado, varbado**

„Fervoja Esperantisto" aperis laŭplane kvarfoje kun 32 paĝoj kaj 10 bildoj resp. desegnaĵoj. Krome ĝi enhavis kvarpaĝajn aliĝilon por la jarkunveno. Kiel kutime ni disdonis multajn varbilojn kaj informilojn sen menciinda rezulto.

En tagĵurnaloj kaj „Unser BSW" ni konstatis 72 publikigaĵojn pri nia agado. Ankaŭ okazis du lokaj ekspozicioj.

6. **Emerituloj**

27 personoj kunvenis la 22. 04. 1999 en Fulda sub la gvidado de Rolf Terjung. Dum posttagmeza urba rondirado Willi Barnickel donis tre interesajn klarigojn kaj vekis rememorojn pri la neforgesita 19a IFK (1967).

7. **Perspektivo**

Konstante la membronombro ŝrumpas malgraŭ fortaj klopodoj de unuopuloj. La ĝenerala situacio, precipe la sekvoj de la privatigo, neniel ŝanĝiĝis. Restas al ni nenio ol barakti kontraŭ ĉiuj tiaj obstakloj por certigi al nia GEFA pluan vivon.

Gießner
prezidanto

IFEF - Kongreß Budapest
Vorauszahlungen

Wie in den Vorjahren sammeln wir auch in diesem Jahr die vorauszuzahlenden Beiträge für Kongreß und Zimmerreservierung. Das Verfahren kann bis Ende Januar genützt werden. Danach eingehende Zahlungen werden kostenpflichtig zurücküberwiesen. Bitte beachten Sie folgendes:

Überweisen Sie den Betrag plus 3 DM zur Deckung unserer Unkosten auf das
Konto 222 91 53 Sparda Bank Berlin BLZ 120 965 97

Empfänger: Stiftung BSW, Zweck: für Kongreß Ungarn. Gleichzeitig senden Sie eine Mitteilung mit der Post,, in welcher Sie angeben, wofür und für wen die Überweisung bestimmt ist, an Frau Helga Vogelsang, Riesenbergsiedlung 48, 99755 Ellrich.

Ihr Aliĝilo senden Sie an LKK mit dem Vermerk, was Sie an das Sammelkonto GEFA gezahlt haben. GEFA

Frühjahrssitzung

Die Frühjahrssitzung des Arbeitsausschusses mit den Bezirksbeauftragten wird, wie in Mülheim beschlossen, am 25. 03. 00 in Fulda stattfinden. Wegen örtlicher Veränderungen im üblichen Tagungslokal, bitte die Verlautbarung in Nr. 1/00 genau beachten. GEFA

Grava honorigo de Heinz Schindler

UEA honorigis nian membron Heinz Schindler per diplomo pro meritoj en la utiligo de Esperanto por monda paco kaj homara feliĉo konforme al la idearo de d-ro Zamenhof kaj instruoj de Onisaburo Deguchi al la celo de UEA kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvo ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

Jen la titolo de la diplomo transdonita en la 84 Universala Kongreso de Esperanto en Berlin.

Ni ĝojas kun li kaj gratulas tre kore. Hg

Joachim Schrapp 85

Am 30. 08. 1999 konnte Joachim Schrapp seinen 85. Geburtstag begehen. Viele Jahre hindurch hat er für GEFA verschiedene Funktionen, u.a. als Sekretär, in vor-

bildlicher Weise ausgeübt. Dafür sei ihm auch hier noch einmal ein ganz herzliches Dankeschön gesagt.
Wir haben dem Jubilar gratuliert und wünschen ihm, daß er unter der aufopfernden Pflege durch seine Frau Ursula noch erfüllte Jahre erleben möge.

GEFA

Rolf Terjung 70

Unser allzeit fröhlicher, tatkräftiger Rolf Terjung feierte am 25. 10. 99 seinen 70. Geburtstag. Viele Jahre schon bekleidet er das Amt des Bezirksbeauftragten Essen. Die Senioren erfreut er seit längerem jedes Jahr mit einer gut geplanten und geleiteten Versammlung. Und erst vor wenigen Wochen hat er die 43. Jahresversammlung in Mülheim (Ruhr) großartig vorbereitet und durchgeführt.
Auch diesem Jubilar sei hier nochmals herzlich gratuliert. Wir wünschen ihm noch viele Jahre in voller Tatkraft bei guter Gesundheit mit Freude am Leben.

GEFA

Jubilea IFES-renkontiĝo en Strussing (Aŭstrio)

La 11an ĝis 17an de septembro 1999 invitis nia aŭstria kolego Hans Geroldinger al la ĉijara jubilea renkontiĝo. Jam pasis 30 jarojn de kiam okazis la 9a kaj 10a IFES en la monta hotelo Strussing. Bedaŭrinde nur malmultaj sekvis la inviton. Entute kunvenis 14 iamuloj el Aŭstrio kaj Germanio.
Tamen la renkontiĝo estis sukcesplena pro la bona organizo, bela vetero kaj afabla servistaro. Ni migris ĉiun tagon kaj ĝuis la montan regionon kaj panoramon de la Alpoj. Eĉ kelkaj el ni migris al la pintoj de „Frommer Kogel" kaj „Tauern Kogel".
La vesperojn ni plenumis per film- kaj diaprezentado pri pasintaj IFES, muziko kaj kantoj ktp. Surprize vizitis nin la lastan tagon kolego Jovan Mirkoviĉ el Maribor.

Vitus Röder

El la grupoj

Bremen: **Ekskurso en interreto (la 9an de junio)** Prelegis Franz Kruse
Por la unua fojo nia grupo renkontiĝis en nia nova kunvenejo en la biblioteko Schleswiger Str., kiu estas gvidata de la kultura centro Brodelpott. Post kelkaj jaroj en la iama ejo Steffensweg la Brodelpott translokiĝis kaj ni sekvis esperante, ke ni havos la okazon pli bone prezenti Esperanton al la publiko pere de la biblioteko.
Ne nur pro tiu fakto nia grupvespero estis rimarkinda: Jam unu horon antaŭ la komenciĝo Franz Kruse kune kun Bodo Ehrlich estis instalinta sian komputilon por enkonduki nin en la eblecojn, kiuj malfermiĝas al uzantoj de la interreto: Ĝi ebligas tutmonde aliri informojn pri ĉiu ajn temo. Per lerta prelego Franz Kruse klarigis al ni la aplikadon de la instalaĵo, kies uzo „ne estas pli komplika ol telefonado". Ni mem povis vidi sur granda monitoro (kvazaŭ televidilo), kio troveblas en la interreto pri Esperanto ĝenerale, pri GEA kaj pri la Bremena Esperanto-grupo resp. la Bremenaj urbmuzikantoj. Cetere eblas havigi al si Esperanto-kurson el la interreto.
Ankaŭ bone funkciis la demonstrado de la „retpoŝto" (E-mail). Franz Kruse malfermis sian „poŝtkeston" (tio kostas nur unu unuon de enurba telefon-alvoko), en kiu troviĝis pluraj „retleteroj", i.a. unu de sinjorino Dietrich, al kiu ni tuj respondis. Estas fascina afero ricevi aŭ sendi interretajn mesaĝojn mondvaste en nur kelkaj sekundoj (kaj je tre moderaj prezoj).

Bedaŭrinde pro iu difekto la kurento subite mankis en la tuta kvartalo. Tial ni ne plu povis ĝui la ricevon de sonoj kaj bildoj/filmoj (ekz. de la rokmuzikgrupo „Amikaro", kiu kantas parte Esperanto-tekstojn.
Tamen mi povas resumi, ke ĉiuj ĉeestantoj (entute 11), inter ili pluraj sen iuj spertoj pri komputiloj, estis impresitaj per tiu altnivela prelego kaj la demonstrado de la interretaj aplik-eblecoj. Do, koran dankon al Franz Kruse! Mi mem bone povas imagi fariĝi interretano post mia pensiiĝo! Hellmut Grebe

Frankfurt: Neuer Treffpunkt in Frankfurt

Da unser bisheriges Domizil „Haus Dornbusch" in der Eschersheimer Landstraße (Frankfurt) aufgelöst wurde, treffen sich Mitglieder und Freunde der BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt i. V. mit der Esperanto - Gesellschaft Frankfurt nun regelmäßig im Saalbau Bockenheim, Schwälmer Str. 28, Frankfurt, Nähe (5 Min.) Bahnhof Frankfurt - West gelegen.
Dieser Bahnhof ist mit mehreren S-Bahn-Linien und auch mit der U - Bahn erreichbar. Unsere Treffen finden jeden 1. Donnersteg im Monat, um 18.30 Uhr statt; so beinhaltet unser Programm am Donnerstag, den 4. 11. 99, Sprachübungen mit dem Thema „Homonyme (gleichlautende, mehrdeutige Worte) in Deutsch und Esperanto" und ein Vortrag über die Sprachen in Europa (sprachliche Situation in den 42 europäischen Ländern, z.B. Amtssprachen, Landessprachen, Sprachen von Minderheiten).
Gäste sind gerne willkommen! Egon Kiefer

Fervojaj novaĵoj

Nova stacio en Frankfurt

De post majo 1999 funkcias nova stacio en la flughaveno de Frankfurt am Main. Tiu servas por pli ol 80 grandrapidaj pasaĝertrajnoj, sed la frekvenco pligrandiĝos post finkonstruo de la rapidtrafika linio inter Köln kaj Frankfurt (177 km) en 2002. La jam ekzistanta subtera stacio en la flughaveno, terminalo 1, servas nuntempe al trafiko inter regionaj stacioj. La nova stacio (anglalingve „Air-rail-terminal") kun du kajoj troviĝas apud la terminalo 1. Super la kajoj leviĝas elipsoforma kupolo, 145 m longa kaj ĝis 14 m alta. La tuta relaro estas kovrita de 690 m betonplato. Sur la plato oni projektas en ses etaĝoj hotelon, restoracion kaj oficejojn. Por atingi la terminalon, la pasaĝeroj trapasas vitran ponton super la aŭtoŝoseo 5. Tie troviĝas ankaŭ restadejo (anglalingve „Lounge") kun vido al la grandrapidaj trajnoj. La stacio inkluzive aliĝajn trakojn kostis ĝis nun 440 milionojn da markoj. Necesis 32.000 m^3 da betono, 13.000 tunoj da ŝtalo kaj sennombra amaso da vitro. Ĝis 2002 Germana Fervojo kaj flughaveno esperas ekspedi valizojn de fervojstacioj al la flugceloj.
Fonto: Eisenbahner - Rundschau 7. 8. 1999 W.B.

Aktualaj grandrapidaj vagonunuoj

En junio 1991 komenciĝis en Germanio nova periodo de la fervoja pasaĝertrafiko. Sur signalteknike speciale ekipitaj trakoj veturis modernaj, belaspektaj vagonunuoj,

la t. n. „Inter - City - Express" (ICE). Ĉiuj 59 vagonunuoj de tipo ICE 1 konsistas el 12 pasaĝervagonoj kun 673 sidlokoj kaj du trakciiloj kun elektraj motoroj. La rekta transmisio al ok trakciaj radaksoj ebligas maksimuman rapidon de 280 km/h. Sed evidentiĝis, ke dum matenaj kaj vesperaj horoj aŭ sur malpli frekventataj linioj tia kapacito ne necesas. Pro tio sekvis en 1966 tipo ICE 2 kun nur 6 pasaĝervagonoj kaj unu motortrakciilo. 391 pasaĝeroj havas sidlokon. La nombro de la trakciaj radaksoj estas kvar. Du vagonunuoj de tipo ICE 2 povas esti kuplataj aŭ malkuplataj laŭ bezono de horaro aŭ merkato. La Germana Fervojo (DB) posedas 44 vagonunuojn de tipo ICE 2.

Okaze de la Monda Ekspozicio 2000 en Hannovro trafikos unuafoje vagonunuoj ICE 3. Ĝi konsistas el ok pasaĝervagonoj kun 415 sidlokoj, sed sen apartaj trakciiloj. La kondukisto sidas en kabino de la unua pasaĝervagono. La elektraj motoroj troviĝas sub la vagonkestoj. 16 trakciaj radaksoj, do la duono de radaksoj, certigas kontinuan kaj sekuran transmision de akcelaj kaj bremsaj fortoj. La maksimuma rapido estas 330 km/h. 37 vagonunuoj de tipo ICE 3 disponas pri la kutima elektroteknika sistemo de DB (trifaza kurento). En 13 aliaj vagonunuoj de tipo ICE 3 estas instalitaj kvar diversaj elektroteknikaj sistemoj, kiuj ebligas per simpla ŝalto la veturadon sur eksterlandaj linioj en Aŭstrio, Belgio, Nederlando kaj Svisio.

Ankaŭ la tipo ICE T ne plu bezonas trakciilojn. La elektromotoroj troviĝas sub la vagonkestoj. Ok trakciaj radaksoj ebligas maksimuman rapidon de 230 km/h. Ĝia specialaĵo estas la kliniĝtekniko, kiu dependa de la relvoja profilo pligrandigas la rapidon ĝis 20% kompare kun konvenciaj trajnoj. La vagonunuo ICE T ofertas 381 sidlokojn. La DB havas 32 vagonunuojn. Simila versio, sed ekipita per dizel-elektrikaj motoroj estas la tipo ICE TD, kvarvagona vagonunuo, same kun kliniĝtekniko. Nombro de sidlokoj: 195. Maksimuma rapido: 200 km/h. Ambaŭ vagonunuoj veturas ekde 1999. Fonto: Bahnzeit extra/99 W.B.

Kristnaskajn bondezirojn



Al ĉiuj legantoj kaj amikoj ni deziras
agrablan adventon
feliĉan Kristnaskon kaj
por la jaro 2000 sanon, feliĉon kaj pacon en la mondo.

La prezidanto aldonas sinceran dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis al la bonfarto de GEFA.

Por ŝpari afrankon, ni ĉi - jare rezignas sendi kristnaskajn salutleterojn al unuopaj personoj.

Redaktfino por FE 1/00 estos la 25. 02. 2000
Herausgeber/eldonanto: Stiftung Bahn - Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main
Schriftleitung /redakcio: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen
Textgestaltung/tekstaranĝo: Klaus-Dieter Hartig, Gustav-Heinemann-Str. 70, 28215 Bremen